MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

ESPERANTO INFORMILO 2

FEBRUARO 2024 Kol. 464/40

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Al societo Espero, Starigita premio, Ekskurso al Sicilio, red.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## Al societo "Espero"

18.(30.)VI.1891(o.v.V-136)

Kun ĝojo mi legis la sciigon, ke vi fondis rondeton por labori por nia afero kun fortoj unuigitaj. Akceptu mian koran gratulon kaj la deziron de la plej bona kaj brilanta sukceso. La societo "Espero" kresku kaj floru kaj alportu eternan benon al nia afero. Ni esperu, ke la rondeto okupos baldaŭ tre gravan lokon inter niaj laborantoj kaj ellaboros al si eternan neforgeseblan nomon en la historio de nia afero; ni esperu ke via energia rondeto baldaŭ fariĝos la patro por multaj aliaj rondetoj en diversaj urboj de nia lando kaj de aliaj landoj. El la koraj kaj fajraj vortoj de via letero mi vidas, ke vi konscias la tutan malfacilecon de nia afero en la nuna tempo kaj la tutan paciencon, je kiu vi necese devos esti armitaj, se vi volas sukcese labori kontraŭ la indiferenteco de la amasoj. Sub la malsukcesoj de la unua tempo ne perdu la kuraĝon kaj energion kaj ĉiam memoru, ke per konstanteco ni pli aŭ malpli frue venkos. Longe staras la vintra glacio kaj ŝajnas, ke la tuta laboro de la sunaj radioj ne povas venki eĉ unu peceton de la glacio; sed la tempo venas kaj la konstanteco venkas, kaj post la unua disrompo rapide fluidiĝas

la tuta glacio. Via letero estos presita en la N° 7 de la "Esperantisto". Mi esperas, karaj amikoj, ke vi ofte kaj regule ĝojigados min per viaj leteroj kun sciigoj pri via laborado. Plej koran saluton al ĉiuj membroj de via societo sendas al vi via aldonita.

L. Zamenhof

El la libro: Unua etapo de Esperanto. 1878-1895 Eldonejo Ludovikito

## STARIGITA PREMIO OMAĜE AL GRÉGOIRE MAERTENS,

Honore al la eksa Prezidanto de UEA Grégoire Maertens, kiu iĝis 100-jara la 1-an de januaro 2024 kaj kiu rolis kiel prezidanto dum la jaroj 1980-1986, estas starigita la premio Grégoire Maertens, aljuĝota ĉiujare al organizaĵo aŭ esperantisto, kiu aparte kontribuis aŭ kontribuas al la progreso de la movado por Esperanto kaj rilataj demandoj. La ĵurio de la premio konsistas el la eksaj prezidantoj de UEA, kiuj pretas servi por tio. Jam konsentis partopreni ĉiuj vivantaj eksprezidantoj: Renato Corsetti, Probal Dasgupta, Mark Fettes, Humphrey Tonkin kaj John Wells. La ĵurio aperigos gvidliniojn pri la proceduro por prezenti proponojn kaj pri la maniero anonci la gajninton ĉiujare. La premio venos el starigata Fondaĵo Grégoire Maertens, al kiu kontribuos la familio Maertens, sed ankaŭ esperantistoj, kiuj admiras la agadon de Grégoire por Esperanto. La fondaĵo celas helpi daŭrigi la premion, kaj donacoj al ĝi bonvenas pere de UEA: https://uea.org/alighoj/donacoj/maertens. Pliaj detaloj pri tiu

omaĝo al Grégoire oni povos legi ankaŭ en la revuo *Esperanto*, kiujn ricevas abonantoj kaj ĉiuj individuaj membroj de UEA.

Por (re)aliĝi al UEA en 2024 kaj (daŭre) ricevi la revuon *Esperanto* bv. aliri la retan aliĝilon de UEA: https://uea.org/alighoj/alighilo – ĉe kiu eblas samtempe donaci al la kreata fondaĵo). El la gazetaraj Komunikoj de UEA

## Ekskurso al Sicilio

Komence de novembro 13 membroj de la E-mental´ grupo veturis al Sicilio. Unue per aviadilo al Bergamo, kie ni enloĝiĝis kaj kune vespermanĝis en unu el multaj agrablaj restoracioj. Interalie, ni gustumis la lokan specialaĵon - polenton (maizkaĉo). Ni veturis per la funikularo al la Malnova Urbo, promenis tra Piazza Vecchia kun mezepokaj kaj renesancaj konstruaĵoj kaj admiris la aspekton de la vespera urbo. Ni eĉ havis la okazon aŭskulti orgenan koncerton en la Katedralo.

.La sekvan tagon ni flugis al Palermo, la ĉefurbo de Sicilio. Palermo estas urbo kun 700 mil loĝantoj en la golfeto sub la pinto Pellegrino. Palermo kombinas la plej bonan el la kulturoj de la tri etnoj, kiuj dominis



Sicilion en la 12-a jarcento: araboj, grekoj kaj latinaj italoj. Post



forta bombado en 1943, la urbo spertis grandan malkreskon sub la regado de la mafio, hodiaŭ ĝi spertas longan kaj postuleman rekonstruon. La ĉefaj aksoj intersekcas la urbon ĉe la placo Quattro Canti (Kvar Anguloj), ĉirkaŭ kiu koncentriĝas plej multaj el la historiaj monumentoj. Dum la regado de normandaj monarkoj, Palermo estis unu el la plej belaj loĝurboj en Eŭropo. En la Mezepoko ĉi tie loĝis ĝis 250.000 loĝantoj. La plej granda monumento de ĉi tiu tempo estas la reĝa palaco (Palazzo Reale). Kune kun la reĝa kapelo (la Cappella Palatina) ĝi estas la plej bela kaj signifa artaĵo de la araba-normanda arto. Ĝi estis konstruita post la normanda konkero de Sicilio en la 11-a jarcento. En la katakomboj de la malnova kapucena kripto konserviĝis dum jarcentoj unika kolekto de homaj mumioj, hodiaŭ ankoraŭ ĉirkaŭ 1000 korpoj, kiuj staras en vico.

Estas proksimume naŭdek belaj preĝejoj en Palermo, ekz. proksime de la fontano sur la Bellini-placo, ili estas la Chiesa San Cataldo-preĝejo (de la j. 1160) kaj kontraŭe la Chiesa di Santa Maria (La Martonara) (de la j. 1143). Ambaŭ preĝejoj kun belaj internoj estas de la normanda epoko, ankoraŭ markita de islama arkitekturo.

En la placo Verdi staras la grandioza teatro Massimo, la plej granda operejo de Italio, konstruita fine de la 19-a jarcento, plena de oro kaj ruĝa veluro kun loĝioj sur ses etaĝoj (scenoj de La baptopatro III estis filmitaj interne).

En la stratoj de la urbo, estas nepreteratenteblaj pupoj pendantaj sur budoj kaj suvenirbutikoj. Ili memorigas gravan sicilian tradicion: Opera dei pupi, tradicia sicilia pupteatro. La profesio de pupisto - puparo - estis familia tradicio. Sed kun la apero de televido, la Opera dei Pupi perdis siajn subtenantojn kaj post kelkaj jaroj ĝi preskaŭ tute malaperis.



Palermo estas ankaŭ hejmo de la plej malnova botanika ĝardeno en Eŭropo, la Orto Botanico, fondita fine de la 18-a jarcento. Ĝi iĝis modelo por la plej multaj ĝardenoj en Eŭropo.

Monte Pellegrino, la 606 m alta kalkŝtona bloko ne povas esti maltrafita. Ĉe ĝia piedo kuŝas Mondello, kiu evoluis de malriĉa fiŝkaptista vilaĝo al unu el la plej popularaj ĉemaraj feriurboj de Sicilio. La famo de Modello estas nedisigeble ligita al ĝia bela strando, 1,5 km longa.

Ni ĝuis ankaŭ belan plaĝon en la urbo Cefalù, kie estas grandioza katedralo konstruita de Roger II. La mozaikoj, plejparte de la mezo de la 12-a jarcento, estas la laboro de bizancaj artistoj, kiujn Roger II igis alporti de Konstantinopolo. La malnova urbo estas inkluzivita en la listo de la plej belaj historiaj centroj en Italio. De la placo kun la katedralo kondukas en ĉiuj direktoj mallarĝaj pavimitaj stratoj. En unu el ili troviĝas la Lavatoio - ŝtona lavejo el la tempoj, kiam la araboj regis la urbon. Ĝi estas tute unika - ĝi estas nutrata de natura fonto kaj funkciis ĝis la 50-aj jaroj de la pasinta jarcento. La labirinto de stratoj finiĝas ĉe la mezepoka pordego de Porta Pescara kaj la ŝtuparo, kiu kondukas al la malnova haveno kaj ankaŭ al la jam menciita sabla plaĝo. En la Madonie-masivo, unu el la plej grandaj protektitaj naturaj areoj en Sicilio, ni parolis kun



gardisto, kiu antaŭforigas fajrojn. Arbaraj fajroj estas bedaŭrinde oftaj en Sicilio dum la somero.

Meze de ĉi tiu monta pejzaĝo kuŝas Castelbuono, ĉarma urbeto kun kastelo konstruita en la j. 1316 de Francesco Ventimiglia, de unu el la plej riĉaj kaj influaj familioj en la historio de Sicilio. Li havis ankaŭ propran palatinkapelon en la kastelo, ornamitan per bela stuko sur ora fono. Ni promenis tra la kastelo kun bela kapelo kaj sur la placo ni gustumis la lokan specialaĵon de manao, pro kiu la urbo estas fama. Ĉi tiu dolĉa rezino de manna-frakseno estas uzata en farmakologio kaj ankaŭ en la loka sukeraĵejo. Castelbuono estas unu el malmultaj lokoj, kie ĉi tiuj fraksenoj estas kultivitaj. Ni renkontis ankaŭ la lokan rubkolektiston - azenulo kun azenoj - allogaĵo por turistoj.

Mi ne devas forgesi la viziton al la apuda fromaĝfabriko, kie ni atestis la produktadon de fromaĝo, de la kolekto de lakto je la 5-a matene ĝis la vendo de finitaj produktoj. Ni gustumis la fromaĝojn dum ili ankoraŭ estis varmaj kaj poste ni provizis ilin por la resto de nia libertempo.

Dum la sekvaj tagoj, ni ĉirkaŭveturis - Gangi, Petralia Soprana, Caccamo kaj aliaj magiaj urboj, sed tio estus por alia artikolo. Do daŭrigota iam venontfoje...

S. Nováková, L. Srbová

**Ekskuzo** el la redacio:
Ni petas pardonon pro nia informo en la lasta numero de Informilo. Jes, Brno estas nur la verŝajna loko elektita por gastigi la Universalan Kongreson en 2025. Brno estas dua la plej granda urbo en Ĉeĥio, kaj situas en la suda parto de la lando, kun bonaj ligoj al Prago, Vieno, Bratislavo, Budapeŝto kaj Katowice. La urbo estas konata pro sia etoso, bela arĥitekturo

kaj riĉa kulturo. La regiono de Suda Moravio estas konata dank' al vitkultivado kaj pitoreska pejzaĝo.
Ni ricevis reagon – klarigon:
Mi povas diri, ke por nun vi estas jes ja la plej "varma" kandidato - kaj mi pensas, ke ĝis fino de januaro eblos anonci la lokon por la ontjara UK!
(Ni devos fintrakti kelkajn lastajn detalojn - ĉefe ja pri tiu "Salono Zamenhof" - Janáčkovo divadlo (vs. alia loko) - ĉar ja diferenco estas sufiĉe granda - 380 mil vs. 900 mil kronoj. Tamen mi certas ke ni trovos solvon kaj eblos jam de februaro fervore labori por sukcesigi la kongreson.



Peter Baláž

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.